

Heinrich Heine, Lorelejo <i>tradukita de Joachim Gießner</i>	Heinrich Heine, Lorelej' <i>tradukita de Leopold Elb</i>	Heinrich Heine, Lorelej <i>tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof</i>	Heinrich Heine, The Lorelei <i>tradukita de L. W. Garn- ham</i>
	<i>Tiu traduko estas po- ste iom modifita de ali- uloj, ne estas la ori- gina traduk-versio de Leopold Elb.</i>		
Malgajon mi sentas en koro, sed kial tia tim'? Legendo el pratempa foro Vagadas tra mia anim'.	Ne scias mi, kial mi estas Malgaja en la kor'. Antikva fabelo re- stas Por ĉiam en mia me- mor'.	Ne scias mi, kial sub- ita malgaj' en la koro naskiĝis; el tempo jam enteri- gita legendo al mi revi- viĝis.	I do not know what it si- gnifies. That I am so sorrowful? A fable of old Times so ter- rifies, Leaves my heart so thoughtful.
Jam fluas la Rejn' en malhelo, kaj malvarmetas l' aer'. Sed brilas la mont' en orbelo pro suna lum' de l' vesper'.	Vespero jam ekmal- heliĝas, Fluadas la Rejn' en trankvil', La supro de l' monto lumiĝas En vespersuna bril'.	Jam malvarmetiĝas l' aero, la Rejno mallaŭte ba- bilas, per oro de l'sun' en vespero la supro de l' monto rebrilas.	The air is cool and it dar- kens, And calmly flows the Rhi- ne; The summit of the moun- tain hearkens In evening sunshine line.
Jen supre kabino pro- vokas per ora juvelar', kaj ŝia beleco allogas kaj ŝia ora harar'.	Belega knabino jen tronas Kun ora juvelar', La belan vizaĝon kronas Mirinde la ora ha- rar'.	Plej belan knabinon mi vidas: en ora ornamo bri- lante, sur supro de l' monto ŝi sidas, la harojn mistere kombante.	The most beautiful Mai- den entrances Above wonderfully there, Her beautiful golden attire glances, She combs her golden hair.
Ŝi kombas ĝin, kantas sorĉige, sirene kantas ŝi per neimagebla, miri- ge potenca melodi'.	Ŝi uzas kombilon el oro Kaj dume kantas ŝi. Mirige tuŝas al koro Sorĉiga la melodi'.	La oran kombilon ŝi movas kaj kantas tra l' pura aero, kaj forto mirinda sin trovas en tiu ĉi kant' de l'vespero.	With golden comb so lu- strous, And thereby a song sings, It has a tone so wondrous, That powerful melody rings.
...	...	...	...

Ŝipiston en eta boato Turmentas koremo- ci'. Ne ĝenas lin rifo- kaskado, rigardas nur supren al ŝi!	Kaj sopiregon eksen- tas Ŝipisto dum sia ve- tur'; Rifaron li ne priaten- tas, Al monto rigardas li nur.	Ŝipet' iras sur la rive- ro, ŝipisto ekstremis de l' kanto, kaj blinda por ĉiu danĝero rigardas li al la kan- tanto.	The shipper in the little ship It effects with woe sad might; He does not see the rocky slip, He only regards dreaded height.
---	---	---	--

Ĝis tiras kun si al Rejn-fundo la ondoj lin kun boat'. Nun kuŝas li en la profundo pro Loreleja kantad'.	Mi kredas, ke dronos finfine Ŝipisto kun sia boat', Kaj tion kaŭzis feine La Loreleja kantad'.	Ha, baldaŭ ŝipisto la bela perdiĝis sub l' akvo- turnado; ĝin Lorelej' faris kruela, per sia mirinda kan- tado.	I believe the turbulent wa- ves Swallow the last shipper and boat; She with her singing craves All to visit her magic moat.
--	--	--	---

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 - †2003-11-25).*

Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)

Tiu ĉi poem-traduko aperis en la kantokolekto "Mia kantaro I", eldonita de Josef Schiffer (Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, ret-adreso: [Josef.Schiffer@t-online.de](mailto:Josef.Schiffer@t-online.de)), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo "Fervoja Esperantisto" de Germana Ferjojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo 3.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).*

Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)

La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 - †1917-04-14).*

Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)

Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.mu.ru/Kolekto/Lorelej.html>.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en la Anglan de L. W. Garnham.*

Arg-2-14 (2003-10-11 23:04:57)

L. W. Garnham, Bachelor of Arts, *LEGENDS OF THE RHINE*; mentioned in: *A Tramp Abroad. Vol 1-2. Leipzig: Tauchnitz, 1880 Band I, Mark Twain 1880*